40
Birštonas, Litovio
BET

# Meandro 2

## Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas

*** Dimanĉo *    2004.07.11**

**HODIAŬ**

### Dimanĉe, la 11an de julio

**07:00 - 08:00** Gimnastiko laŭ sistemo de jogo; dezirantoj iru al la sportista komunloĝejo (str. Birutės 19, proksime de preĝejo kaj gastodomo "Blanka tulipo"). Gvidos samideano el Koreio, kiu esperantiĝis sian nomon je Ĉielo.

**08:00 - 09:00** MATENMANĜO

**09:00 - 10:00** Organizaj kunvenoj de kursgvidantoj kaj kursanoj, de prelegantoj kaj gvidantoj de aliaj programeroj – administrejo de la sanatorio, dua etaĝo, salono 204.

**09:00 - 12:45** Diplomiga seminario de IEI; gvidas Atilio ORELLANA ROJAS kaj Ana MONTESIMOS – en konstruaĵo de magistrato, str. Jaunimo 2.

**11:00 - 12:00** Malfermo de Somera Universitato (SU). Prelego de Stanislaw MANDRAK "Gotenburga kongreso en fotoj de Stano MARČEK" – salono 204.

**11:00 - 13:00** Malfermo de la 3a BEF Prelego de Aleksander KORĴENKOV "Pri la Esperanta traduk-literaturo"

**11:30 - 12:00** Malfermo de filatela ekspozicio de Marius DYGLYS "Bildoj de Rafaello en poŝtmarkoj" – en Sakrala Muzeo (str. Birutės 10, apud la preĝejo).

**13:00 - 14:00** TAGMANĜO

**14:00 - 15:00** Prepariĝo por la solena inaŭguro de BET-40.

**14:00 - 15:00** Publika lanĉo de la "Ĉeriza ĝardeno" – la plej nova libro de eldonejo "Sezonoj" – en salono 204.

**15:00 - 16:30** SOLENA INAŬGURO DE BET-40 KAJ KONCERTO – en Kulturcentro (str. Jaunimo 4).

**17:00 - 18:00** Katolika Sankta Meso en Esperanto – en preĝejo (str. Birutės 14).

**18:00 - 19:00** VESPERMANĜO

**19:00 - 20:00** Instruado de kantoj; gvidos Vida ČOJIENĖ – en salono 204.

**19:00 - 20:00** Koncerto de Sigutė TRIMAKAITĖ (soprano) kaj instrumenta grupo – en la preĝejo.

**21:00 - 22:00** Distra vespero – en apuda domo ĉe la administrejo de la sanatorio (salono sur unua etaĝo)

## Konciza Historio de BET-oj

La unua BET (komence ĝi nomiĝis tendaro) okazis en 1959 ĉe la lago Baltezers apud Riga. Estis decidite ĉiujare organizi similajn renkontiĝojn laŭvice en tri baltaj respublikoj: Estonio, Latvio, Litovio. Dum sovieta tempo estis malfacile organizi BET-ojn kaj dum la jaroj 1973 kaj 1979-1982 pro diversaj obstakloj ili ne povis okazi.

Entute en Litovio BET-oj okazis (parenteze, nombroj de la partoprenintoj):

| | |
|---|---|
| 1961 | en Molėtai (204) |
| 1964 | en Veisiejai (153) |
| 1967 | en Vilnius (337) |
| 1970 | en Kretinga (316) |
| 1976 | en Viekšniai (241) |
| 1983 | en Noreikiškės (358) |
| 1986 | en Smalininkai (472) |
| 1989 | en Noreikiškės (580) |
| 1992 | BET ne okazis, ĉar en Kaunas okazis 75a SAT-Kongreso (617) |
| 1995 | en Girionys (240) |
| 1998 | en Veisiejai (253) |
| 2001 | en Noreikiškės (386) |
| 2004 | en Birštonas (ĉ. 250 ) |

## Prezidento de Litova Respubliko

*ESTIMATAJ BALTLANDAJ ESPERANTISTOJ,*

Mi sendas korajn bondezirojn kaj salutojn al via komunumo, kiun jam kvardekan fojon kunvenigis ligoj kun ĉi tiu unika lingvo.

Kun la lingvo, kiu unuigas homojn de malsamaj nacioj, profesioj kaj aĝoj, kiu kvazaŭ per pontoj kunligas diversajn kulturojn kaj estas egale proksima al ĉiuj homoj parolantaj ĝin.

Mi ĝojas, ke al vicoj de esperantistoj ĉiujare aliĝas ĉiam pli multe da homoj, ke geografio de Esperanto plivastiĝas kaj trovas novajn landojn, novajn eblecojn de interkomunikado. Estas ĝojige, ke la verko de Ludoviko Zamenhof por multaj el vi fariĝis la dua, kaj por iuj eĉ la plej grava lingvo de interkomunikiĝo.

La fakto, ke sennacia lingvo, unuiganta milionojn da homoj, ekzistas jam pli ol cent jarojn, pruvas ĝian signifon por instigo de interkomunikado, reciproka interkompreniĝo ankaŭ por pliriĉigo de kultura sperto de la tuta homaro.

Al via aranĝo mi deziras vivan kunlaboron, plej bonan sukceson al ĉiuj gastoj kaj partoprenantoj, al ĉiuj amantoj de la lingvo Esperanto.

**Artūras Paulauskas**
Provizora prezidento de Litova Respubliko

La 10an de julio, 2004



*Artūras Paulauskas*
*Provizora prezidento de Litova Respubliko*



GERBIAMIEJI BALTIJOS ŠALIU ESPERANTININKAI,

*Jen la litova teksto de la mesaĝo de Artūras Paulauskas*

**Rimarko:**

Artūras Paulauskas estis provizora, ĉar morgaŭ ĵuros kaj ekoficos nova prezidento Valdas Adamkus, elektita en la 27a de junio. V.Adamkus pli frue estis prezidento kaj trifoje salutis niajn Esperanto-aranĝojn. Ni esperas, ke li konsentos esti Alta Protektanto de la 90a UK en Vilnius.

**Anonco:**

Gazetara agentejo DISVASTIGO *www.disvastigo.it*, kiu kelkaj jarojn dissendas novaĵojn, artikolojn kaj dokumentojn pri problemoj de komunikado internacia en defendo de lingvoj kaj kulturoj, etendas sian agadon al novaj membroj-ŝtatoj de Eŭropa Unio, serĉas kunlaborantojn precipe en la fako de gazetaraj revuadoj. Intersitaoj povas kontakti la direktoron de Disvastigo Giorgio Bronzetti (*gbronzetti@disvastigo.it*), kiu ĉeestas en la BET (ĉambro 406)

**Louis C.Zaleski-Zamenhof**

Saluton al vi, estimataj kaj karaj Gesamideanoj, kunvenintaj en tiu ĉarma urbeto por partopreni la 40ajn Baltajn Esperanto-Tagojn. Tagojn, kiujn vi nomis "jubileajn", kiuj tamen ĉefe estas la unuaj, okazintaj ene de la Eŭropa Unio. Ene de kontinento, kie ne plu staras muroj de miljaroj inter popoloj iam dividitaj; kie administraj limoj malaperis; kie neniu plu ĝenas la vojaĝantojn inter la Balta marbordo kaj la marbordo Mediteranea aŭ Atlantika.Kaj kie la dudek kvin nacioj unuigitaj klopodas fari en konsento unu grandan rondon familian… Tamen, ve, la obstinaj baroj ne ĉiuj dissaltis; la lingvaj baroj persistas ankoraŭ, ĉar mankas la neŭtrala lingva fundamento por interkompreno de popoloj surbaze de ilia lingva egaleco. Lingva egaleco, la grava elemento de egaleco inter homoj. Kvankam tiu neŭtrala fundamento fakte ne mankas; ĝi ekzistas jam longdaŭre, almenaŭ kaŝita al la malvidantoj aŭ al tiuj, kiuj ĝin vidi ne deziras.

La freŝelektitaj eŭroparlamentanoj de Baltaj ŝtatoj, same kiel de aliaj, baldaŭ al Straburgo ironte, spertos tiean lingvan malegalecon en la rilatoj internaciaj. Ili observos avantaĝon de denaskaj anglo-parolantoj kaj spertos sian propran tiurilatan malsuperecon.Tiam vi, la Baltaj esperantistoj, elkovru al viaj parlamentanoj la internacian lingvon neŭtralan, ĝuste la lingvon celantan egalecon en internaciaj rilatoj, lingvon kiu ne plu strebas sin substitui al lingvoj naciaj. Klopodu konvinki viajn parlamentanojn, ke uzante lingvon neŭtralan, kiel duan lingvon por ĉiuj, ni protektas la survivon de lingvoj propraj eĉ al nombre etaj popoloj, de lingvoj esprimantaj ilian kulturon. Klopodu konvinki viajn eŭroparlamentanojn aldoni iliajn voĉojn al tiuj de iliaj kolegoj voĉdonantaj por uzado de lingvo neŭtrala. Por uzado de lingvo, kiu, ankoraŭ antaŭ sia naskiĝo, muriĝis ĉi tie, sur la bordo de litova lago en Veisiejai; lingvo kies patro estis Ludoviko Zamenhof; lia amata litova edzino Klara povas do esti konsiderata kiel ĝia patrino; lingvo, kies unua fervora sponsoro estis Litovo, Aleksander Silbernik.

Esperante viajn klopodojn kronigotaj per sukceso, mi sincere salutas viajn Baltajn Tagojn kaj al ĉiuj partoprenantoj kaj al ĉiuj partoprenantinoj deziras multe da plezuro.

2004.07.04, Parizo



*Momumento al Zamenhof en Veisiejai*

## Unua tago sur fotoj:

kunveno de partoprenantoj (maldekstre) kaj koncerto ĉe fontano (dekstre).





# Suno subiras

Litova popolkanto
Tradukis Petras ČELIAUSKAS




Vi foriris laux pado rosplena,
Brilis steloj sur nokta firmament',
{Kalkulante steletojn vi eldiris,
Ke neniam forvelkos amo-sent'.} 2f.

Miriadoj da steloj argxentaj-
Kunkalkuli ja estas fantazi'.
{Vidis mi - jam brakumis vin alia,
Viajn lipojn kisante kun pasi'.}2f.

Ke nia informilo **MEANDRO** estu pli interesa, tio dependas ankaŭ de vi! Skribu viajn impresojn, proponojn, kritikojn, ankaŭ anoncojn pri viaj programeroj. Mallongajn artikoletojn transdonu al la redaktoroj au restigu en registrejo. Pli longajn artikolojn pri la aranĝo skribu por LITOVA STELO.

*Kantemuloj kolektiĝu por komuna ĝuo antaŭ la sunsubiro. - Vida*

ABONU *la revuon*

LITOVA STELO



Redaktoroj: Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok